


SCIENCA REVUO de  
Internacia Scienca  
Asocio Esperantista  
BEOGRAD, Jugoslavio

E1 Vol. 28  
n-ro 4(126)  
30.08.1977.



DAVID LVOVIČ ARMAND

(1905 - 1976)

La 28-an de novembro 1976. en Moskvo forpasis homo de mirinda ĉarmo, senlaca batalanto por justo kaj progreso, brila teoriulo de geografio, unu el inspirantoj kaj strategoj de la nuna etapo de naturdefendo, elstara aganto de E-movado en Soveta Unio, profesoro David Lvovič Armand.

Armand naskiĝis en Moskvo en la 1905. Liaj gepatroj, homoj kun alta kulturo, filozofoj laŭ la profesio, dediĉis sin al la revolucio. Tial ekde la infaneco li estis edukata en atmosfero de batalo kaj vivkomplikaĵoj.

En 1927 post fino de elektromaŝinokonstrua instituto Armand komencis sian profesion laboron. Malgraŭ multaj inventoj en ĝi kaj la rapida ofica kariero (li iĝis estro de galvanata fako en la granda Moskva uzino "Dinamo"), Armand pli kaj pli cedas al sia alia pasio - naturosploraj vojaĝoj. En la 1934. en la gazeto "Sur tero kaj maro" li publikigis sian unuan turisman eseon "En Ĥibinaj montoj", post kiu sekvis la tuta serio da atentokaptaĵaj rakontoj pri aliaj liaj vojaĝoj.

Kio pli ol geografio respondas al vojaĝopasio! Fininte en la 1940. geografian fakultaton de la Moskva Ŝtata Universitato li ekoficis kiel scienc esploristo en la Geografia Instituto de la Scienca Akademio de USSR. Samtempe kun la scienca Armand fruktodone laboras sur la sciencopopulara kampo.

Dank'al solidaj inĝenieraj scioj Armand iĝis unu el pioniroj en apliko de modernaj fizikaj kaj matematikaj metodoj en la sovetia geografio. Ankoraŭ en la 1947. kiam en la geografio senlime regis priskribo-registraj metodoj, li elpaŝis kun la avangarda artikolo "Fundamentoj de bilanco-metodo en la fizika geografio".

La inĝeniera pensmaniero helpis al li kroni multajn teoriajn esplorojn per teknikaj enkorpiĝoj. Li inventis geomorfologiajn trogon, kiu ebligis "Eksperimentan esploron de eroziaj procezoj" (1950); samtempe kun la studado de pedo-erozio li pensis pri la kreo de agrikulturaj maŝinoj, kiuj ne kaŭzu damaĝon al pedo.

Natursciencaj, teknikaj kaj matematikaj scioj de Armand atingis harmonian kunfandiĝon en lia doktora disertaĵo "Fiziko-geografiaj fundamentoj por projektado de kampdefendaj retoj de forstostrioj", defendita en la 1957. kaj publikigita en la 1961.

En la 1961. li ekestris la Kurskan stepan fiziko-geografian stacion kaj gvidas tie esplorojn en nova de li kreita direkto - fiziko de landŝafto.

Li daŭrigas studi logikon kaj eĉ finas en la 1971., estante jam emerita profesoro-konsultanto, dujaran kurson de la supera matematiko! Rezulte en la 1975. aperis la ĉefverko de Armand, sintezinta la tutan lian preskaŭ 40-jaran sperton de geografo - "Scienco pri landŝafto" - ("Fundamentoj de la teorio kaj logiko-matematikaj metodoj").

En la monda geografia literaturo troveblas nemultaj verkoj tiom altaj teorie kaj brilaj stile. Entute li kreis ĉirkaŭ 750 sciencajn verkojn, inkluzive tradukojn, recenzojn, raportojn (15 estas libroj) kun la suma amplekso pli ol 700 aŭtoraj folioj. Ĉirkaŭ 100 liaj verkoj estas tradukitaj en 14 lingvojn. Li mem tradukis 10 verkojn, ne kalkulante kelkcent recenzojn. Publikita estas nur ĉirkaŭ duono de lia tuta verkaro.

Kontraste al granda socia rekono Armand estis en la vivo mirinde modesta kaj simpla. Sian infanan kredon, ke "al homoj oni devas rilati ĉiam bone", li portis antaŭ si kiel torĉon. Dum la tuta konscia vivo li ageme kulturis bonon, ĉerpante en la renkonta ondo de bonaj sentoj kaj faroj energion por sia profunda optimismo.

Armand skrupule bilancas ĉiujn "por" kaj "kontraŭ" en rilatoj inter la socio kaj naturo kaj konkludas, ke ama bonmastra rilato al nia panjo Naturo garantias al la Homaro progreson. Sur tio bazitan optimismon Armand misiiste propagandas en centoj da stud- kaj publikprelegoj - ruse kaj esperantlingve (dum la internaciaj Someraj Universitatoj de UK en Sofio, Budapeŝto, Helsinko, Kopenhago).

La teorion Armand intime ligis al la praktiko, partopreninte en la 50-aj jaroj kreon de la naturdefenda Leĝo de Rusia Federacio. En ĝi ĉefa atento estis donita al la ekspluatata sed ne konservata naturo. Tio signifas kvalite novan etapon en la koncepto de la naturdefendo. La nova naturdefenda leĝaro de Sovetio, en multo perfekta kaj imitinda, maturiĝis sub la decida influo de David Lvoviĉ.

Kvankam Armand povis paroli kaj skribi en 7 lingvoj kaj eĉ iom malĉifri la ĉinan kaj japanan, lia koro ĉiam estis kun la internacia lingvo Esperanto.

En Esperantujo lin allogis konatiĝo en la 1923. kun la unika ruso, blinda poeto, esperantisto Vasiliĵ Jeroŝenko. Jeroŝenko sorĉis lin per la rakontoj pri fabelaj landoj, "viditaj" dank'al Esperanto, pri la fratiĝo kaj interhelpo de la esperantistaro.

Al internaci-lingva problemo Armand rilatis same science profunde kiel al ĉio. Li esploris ĝin en 47 artikoloj el kiuj 13 estas en Esperanto. Inter ilimajestas fundamentaj ruslingvaj studoj "Esperanto serve al geografio" (1962.), "Scienc-teknika informado kaj problemoj de multlingveco" (1963., nova versio 1968.).

Sume en Esperanto Armand verkis 34 artikolojn, partoprenis preparon de la Mondmapo (Jugoslavio, 1968.) kaj Poŝatlaso de mondo (Ĉeĥoslovakio, 1971.).

L.V. Medvedev